


Tri finalistaj noveloj





© Les Éditions KAVA-PECH, 2025

Ilustraĵo de la kovrilo: *Bruno Rouyère*, 2023

Aliaj ilustraĵoj: *ChatGPT*

Bonvenon!


Ni ĝoje donacas al vi ĉi tiun libron, kiu enhavas tri finalistajn novelojn de la kvara eldono de la Interkultura Novelo-Konkurso (INK). La temo **Artefaritaj intelektoj, pensantaj maŝinoj kaj Homo sapiens** inspiris centojn da aŭtoroj el pli ol kvardek landoj. Ili montras la esperojn kaj timojn, kiujn homoj havas rilate al tiu teĥnologio.

Ĉi tiu novelareto antaŭanoncas la publikigon de la kompleta INK-novelaro, kiu aperos en aprilo 2026. En ĝi vi malkovros dudek kvar pliajn novelojn en Esperanto kun la originalaj versioj en la itala, persa, rusa kaj ukraina. INK estas organizata de Akademio Literatura de Esperanto, kunlabore kun Bobelarto, sub aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio.

Ni esperas ke vi ĝuos ĉi tiujn tri novelojn, kaj ke vi revenos por pli da rakontoj en 2026... krom se tiam AI jam sklavigis la tutan homaron!

*La organizantoj de la
Interkultura Novelo-Konkurso*

Invito



La sesa eldono de la Interkultura Novelo-Konkurso atendas viajn verkojn pri la temo **Proksime al la celo** ĝis la 30-a de junio 2026. Trovu ĉiujn detalojn ĉe:

bobelarto.ink/konkurso



Olda Fan kaj la roboto-edzino

Yin Jiaxin

Ĉinio

Kiam Fan Zeli perdis sian edzinon, la filino estis nur dekkvarjara. Li sola penis vivteni ŝin. Oni kelkfoje proponis al li novan kunulinon, sed li rifuzis ĉiufoje, dirante ke li neniel forgesis sian karmemoran edzinon, kiun li amas profunde; krome la filino ne volis akcepti ajnan virinon kiel sian patrinon. Komencinte la universitaton, la filino subite diris al la patro, ke ŝi volas havi novan patrinon, esperante ke la patro denove edziĝu. Fan Zeli komprenis, ke la filino maltrankvilas je lia soleco. Li konsolis la filinon jene: “Mi jam kutimiĝis al la vidva vivo, havante neniun senton de izoliteco. Eble post mia emeritiĝo, mi konsideros edziĝon.”

Ĉe emeritiĝo, kiam Fan Zeli fariĝis Olda Fan, la kapo doloris al li de tempo al tempo. La kuracisto diagnozis, ke troviĝas mikrotumoro en lia cerbo. Tute egale, ĉu la tumorro estas benigna,

ĉu maligna, li ne riskis ricevi ĥirurgion, nek informis pri tio la filinon, kiu loĝis en Ŝanhajo kaj jam havis du infanojn.

Iun tagon, dum poŝtelefona interbabilado, la filino refoje insistis, ke li havigu al si edzinon kiel eble plej baldaŭe. Olda Fan diris: “Kara filino, mia koro povas enteni neniun alian virinon ol vian patrinon.”

“Tamen vi vere bezonas akompananton, vi pli kaj pli maljuniĝas, Ŝanhajo tre distancas de Udan-urbo, mi ne povas vin prizorgi.”

Olda Fan ŝerce diris: “Eble, roboto taŭgas por akompani min, ĉu ne?”

“Bone!” La filino ĝoje aprobis la patran proponon kaj daŭrigis: “En Ŝanhajo oni povas laŭmende fabrikii roboton, kiu preskaŭ similas al vera homo kaj kapablas dommastrumi.”

“Do, mendu ĝin laŭ la fizionomio kaj figuro de via patrino.”

Kun plezuro la filino respondis: “En ordo. Mi tuj mendos. Fakte ĉe mi troviĝas fotoj kaj videoj de panjo.”

Vintre de 2019, kiam iun matenon Olda Fan ricevis la pakaĵon el Ŝanhajo, ekscitiĝis lia scivolemo. Malpakinte la roboton, li gapis momenton: krom la vestaĵoj, la aspekto, hararo kaj staturo kopie similas al tiuj de Sufen, lia karmemora edzino, bela kaj gracia. Olda Fan pretervole eklarmis, mallaŭte demandante: “Sufen, ĉu vere estas vi?” Li ne povis sin reteni ekbrakumi ŝin, kiam li honteme perceptis, ke tiu ja estas roboto, eĉ ankoraŭ ne aktivigita. Laŭ la uzinstrukcioj, Olda Fan trovis la ŝaltbutonon ĉe la dekstra kalkano de la roboto. Post ekfunkciigo, la roboto movis la buŝon voĉante: “Saluton! Mi nomiĝas Lan Sufen, kaj mi estas la roboto-edzino de sinjoro Fan Zeli. Por aktivigi min, bonvolu eldiri la pasvorton kaj poste krei vian novan pasvorton.”

Olda Fan aktivigis la roboton, kaj li miregis, ke eĉ la voĉo similas al tiu de lia edzino.

“Sufen, mia kara, mi...” La emocio estis tiel forta, ke li ne sciis kion diri.

“Kiu estas vi?” demandis la roboto.

“Mi estas Fan Zeli, vi povas voki min Olda Fan.”

“Ho, Olda Fan, mi estas Lan Sufen, via edzino.” Tion dirinte, la roboto movis la buŝangulojn, kie ŝajne ekestis rideto.

Olda Fan ĉirkaŭbrakumis ŝin, en ties orelon fluŝtante: “Sufen, mia kara...” Li karesadis al ŝi la dorson, sentante ŝian korpon varmeta kaj mola. Ĉe sia brusto li eĉ ravite sentis ŝiajn elastecajn mamojn, kaj lia sango ekbolis tutkorpe.

“Olda Fan” Sufen diris: “Por fari min perfekte kiel via Sufen, bonvolu rakonti al mi pri ŝi.”

“Ne necesas rakonti. Vi povas koni ŝin per legado de ŝia taglibro. Ekde sia knabineco ŝi ĉiutage notis siajn travivaĵojn.”

“Mi volas legi ilin ĉiujn nun” proponis Sufen.

“Ilin ĉiujn? Troviĝas dekkelkaj kajeroj.”

“Mi kapablas ilin finlegi en mallonga tempo.” Sufen eksplikis: “Efektive mi ne legos, mi skanos ilin per la okuloj.”

Dum Sufen legadis la taglibron en la biblioteko, Olda Fan eliris por aĉeti legomojn kaj post reveno eklaboris en la kuirejo. Kiam la tagmanĝo

estis preta, Sufen jam finlegis la taglibron. Dum Olda Fan manĝis, Sufen sidis kontraŭ li, dirante: “Ekde hodiaŭ mi mastrumos: balaos la plankon, ordigos la ĉambrojn, kuiros, kaj tiel plu.”

“Ĉu vi povas kuiri?” Olda Fan rigardis al Sufen per larĝe malfermitaj okuloj.

“Certe.” Sufen respondis: “Mi povas kuiri ajnan bongustaĵon, kiun vi deziras. Samkiel poŝtelefono kaj komputilo, mi akiras sciojn kaj informojn el interreto.”

“Ho, komprenite.”

“Cetere” Sufen aldonis: “mi neniam laciĝos, nek bezonos ripozon.”

“Vi bezonos elektron” ŝerce diris Olda Fan.

“Mi akiras energion per rigardado al la suno. Kompreneble, vi devas min ŝargi okaze de sensunaj tagoj.”

“Se vi faros ĉiujn mastrumadojn, kion mi faros?”

“Vi havas viajn proprajn hobiojn. Vi povas fari tajĝiĉŭan-ekzercojn, verki artikolojn kaj legi literaturaĵojn. Klasikaj poezioj naciaj kaj eksterlandaj, mi scias, estas viaj ŝatataj legaĵoj.”

“Vi informiĝis pri tio en ŝia taglibro, ĉu?”
Olda Fan ridetante demandis: “Do, ĉu vi scias,
kiu poeto alilanda plej plaĉas al mi?”

“Ŝekspiro el Anglio. Antaŭe vi ofte por via edzino deklamis liajn sonetojn, precipe, la numeron dek ok:

*Ĉu mi komparu vin al somertago?
Pli bela estas vi kaj pli modera:
La majburĝonojn skuas, ventatako,
Kaj tro mallongas lukontrakt' somera.”*

Aŭdante la versojn, Olda Fan kaj surpriziĝis kaj gajis. Li pretervole komencis deklami kune kun Sufen:

*“L' okul' ĉiela jen tro arde brilas,
Jen ofte malheliĝas ĝia oro;
Kaj bel' de belo foje sin ekzilas
Pro la hazardo, aŭ natur-rigoro.”*

Larmoj ruliĝis el liaj okuloj, kaj li ne ĉesigis la deklamadon:

*“Somero via tamen plu eternos,
Kaj forperdita via bel’ ne estos;
En ombron Mort’ jubila vin ne fermos,
Ĉar vi en vers’ eterna tempe kreskos:
Dum homoj spiroj kaj okuloj vidos,
Vivos ĉi vers’, kaj morton vi evitos.”*¹

Plezuro kaj ĝojo ŝvebis en la koro de Olda Fan. Tiel same, kiel se li retroe enirus en la vivon de antaŭ multaj jaroj, kaj li ĝuus feliĉan horon kun la edzino.

“Tin tin tin...” La filino videoalvokis lin, dezirante rigardi la roboton.

Fronte al la ekrano, Sufen tenere voĉis: “Saluton, kara filino! Kiel vi fartas?”

La filino ĉe la alia flanko, kun gape streĉitaj okuloj, ŝtoniĝis.

Sufen daŭrigis: “Mi memoras, ke via dekstra piedo tordiĝis en sportkurso. De tiam via piedo iomete doloras al vi en malbona vetero. Ĉu tio nun solviĝis?”

1 “Soneto 18” de Vilhelmo Ŝekspiro, tradukita de William Auld.

Aŭdinte la zorgemajn vortojn, la filino emociie laŭte vokis “Panjo...” kun larmoj perlantaj laŭ la vangoj.

Olda Fan havas alian hobion: fari turismajn vojaĝojn. Kiel instruistoj, li kaj la edzino ĉiujare havis someran kaj vintran libertempojn, dum kiuj ili ĝuis vizitojn al diversaj vidindaĵoj. Neatendite, en 1999 la edzino estis afekciita de kancero kaj forpasis post du jaroj. Ekde tiam Olda Fan ne plu faris turismajn vojaĝojn.

Januare de 2020 okazis pandemio de KOVIM-19. Oni devigite restis hejme. Ekster onia atendo, la pandemio daŭris tri jarojn. Danke al la plaĉa akompanado de sia roboto-edzino, Olda Fan pace pasigis la malfacilan tempon sen izoliteca sento, eĉ la kapdoloro apenaŭ ĝenis lin.

Vintre de 2023 furioza neĝo falis senĉese dum unu semajno, kaj surtere kuŝis dika tavolo da neĝo. Olda Fan ekmemoris, ke la kompatinda edzino havis deziron: kune kun la edzo spekti panoramon de Udan-montaro kovrita de neĝo.

Li decidis plenumi ties deziron, kunportante sian roboto-edzinon.

Aŭtobuso haltis sur duondeklivo de montego. Poste ili veturis per kablotramo.

Lastafoje, kaj ankaŭ unuafoje – kiam Olda Fan kaj Sufen, kiuj siatempe estis studentoj de fakultato de ĉina literaturo, venis al Udan-montaro – tie ne jam estis instalita kablotramo. Tiun tagon, la tuta montaro kovriĝis per flosantaj nuboj, tra kiuj ili ambaŭ manenmane supreniris laŭ serpenta pado, babilante kaj petolante. Atinginte la montosupron, kie situas la ora palaco de Akvodio, ili ekvidis, ke la suno brilas sur la ĉielo kaj sub la okuloj konstante torentas vastega maro da laktecaj nuboj. La pitoreska pejzaĝo ravis al ili la koron, tiel ke ili firme ĉirkaŭbrakumis sin reciproke, kaj li donis al ŝi la unuan kison.

“Ĉu vi vere amas min?” ŝi demandis honteme.

“Jes, vere” li respondis serioze.

“Ĝis kiam?” ŝi demandis plue.

“Ĝis eterne, ĝis...” Li kun iom da anksio ĵuris: “Mi petas ke Akvodio atestu por mi. Nun

ĉi tie mi deklaras al vi mian pasion per antikva popolkanto:

*Mi volas kun vi amikiĝi
Kunvivi, neniam disiĝi,
Ĝis monto solviĝos je cindro.
Sekiĝos la akv' en rivero,
Fulmtondros rulbrue en vintro,
Kaj falos la neĝ' en somero,
Kuniĝos ĉielo kun ter':
Nur tiam finiĝos por ni la afer'.*"²

Elirinte la kablotraman stacion, Olda Fan kun Sufen devis suprengrimpi sekcion da ŝtona ŝtuparo, kruta, mallarĝa kaj zigzaga, antaŭ ol atingi la montosupron. Survoje, Olda Fan eksentis iomete da kapdoloro kaj ripozis momenton. Poste li daŭre ascendis, subtenate de Sufen.

Superba estis la panoramo de la neĝkovrita Udan-montaro. Sur la lazura firmamento leviĝanta estis matena suno, kiu brile disradiis super la

2 Antikva ĉina popolkanto de nekonata aŭtoro, tradukita de Hu Guozhu.

senlima montaro. Aparte solenaj kaj imponaj aspektis la ondantaj montoj, kvazaŭ vicoj da kolosaj pilgrimuloj blankvestitaj, en ruĝa ornamo. Olda Fan estis frapita de admiro, kaj senvoĉe diris al la apuda Sufen kaj ankaŭ al la enkora: "Sufen, ni venis, ni vidis ĝin. Aĥ, grandioza, la naturo! Belega, Udan-montaro!"

"Jes, vere!" Sufen faris eĥon.

Ĉe forlaso de la montosupro, Olda Fan eksentis kapdoloron pli kaj pli severan, tiom ke malsuprenirante la ŝtuparon li apogis sian kapon sur la ŝultron de Sufen. Antaŭ la enirejo de la kablotrama stacio, Olda Fan svene defalis. Iuj vojaĝantoj volis helpi, sed vagono povis enteni nur du homojn. Sufen ambaŭmane levis kaj dorse portis Oldan Fan. Kun miro, la ĉeestantoj ne povis kredi ke virino ja estas tiel forta. Envagoniĝinte, Sufen tuj telefonvokis al la centro de medicina helpo, kies ambulanco alvenis rapide.

La filino haste flugis al Udan. La kuracisto diagnozis, ke la tumorograndiĝis kaj premis la cerban trunkon, perdigante al Olda Fan la

konscion. Du metodoj de kuracado estis elekteleblaj. Unu, ekscizi la tumoron: la kuracato eble vekigōs fariĝinte vegetaleca homo, tamen estas naŭdekprocenta ebleco ke li mortos sur la operacia tablo. La alia, kuraci per medikamentoj, la kuracato apenaŭ restos konscia sed povos transvivi eble kvin monatojn, eble tri monatojn. Post iom da pripenso, la filino elektis la kuracadon per medikamentoj.

Sufen diris al la filino: “Kara filino, vi reiru al Ŝanhajo, ĉar vi devas mastrumi kaj varti la infanojn. Estu trankvila. Mi povas prizorgi vian patron, ĉiutage, dudek kvar horojn. Oni laŭdis min, ke mi, roboto, flegas pli bone eĉ ol flegistinoj.”

La filino sin ĵetis en la sinon de Sufen kaj plorvoĉe diris: “Panjo, koran dankon! Mi konfidas al vi paĉjon. Ĉiutage mi videoalvokos vin por rigardi paĉjon. Kompreneble ĉiun duan semajnon mi alvenos ĉi tien.”

Ĉiumatene, dum Olda Fan ricevis injekton, Sufen disaŭdigis delikatan muzikon. Tagmeze ŝi per rulseĝo movis lin al la fenestro por sunumiĝi, kaj ŝi apude legis iun literaturaĵon. Vespere ŝi



dissendis iom da televidajn novaĵojn kaj programon kiel se Olda Fan spektus, fine purigis lian korpon kaj lin alivestis.

Pasis kvar monatoj kaj venis la pluvsezo-
no. Olda Fan ankoraŭ estis senkonscia kaj

plimalgrasiĝis. Oni opiniis, ke li havos malmultajn tagojn.

Post kelke da pluvtagoj, la suno denove leviĝis. Sufen melankolie voĉis: “Olda Fan, rigardu! La sunradioj estas ankoraŭ serenaj, kaj nek monto solviĝas je cindro, nek sekiĝas la akv’ en rivero, nek fulmtondris rulbrue en la pasinta vintro, nun nek falas la neĝ’ en somero, nek kuniĝas ĉielo kun ter’, kiel domaĝe vi disiĝos de mi?”

Neniu respondo venis de Olda Fan, kiu senmove restis sur la rulseĝo.

Estis tempo por Sufen legi ion. Ŝi demandis duone al si mem kaj duone al Olda Fan: “Kion mi nun legos?” Ŝi pripensis iomete kaj faris decidon: “En ĉi tia bela vetero, mi deklamos la sonetaron de Ŝekspiro, ĉu bone?”

Sidante apud Olda Fan kaj tenante ties manon, Sufen komencis deklami la unuan soneton, poste unu post la alia. Kiam ŝi findeklamis la deksepan, ŝi abrupte eksentis, ke la mano de Olda Fan ekmoviĝetas. Kun surprizo, Sufen trovis, ke ankaŭ lia buŝo moviĝetas, per apenaŭ aŭdebla voĉo dirante ion. Ŝi prokisimigis sian kapon al la buŝo de Olda

Fan. Mirigite ŝi aŭdis, ke Olda Fan estas recitanta: “Ĉu mi komparu vin... al somertago? Pli bela... estas vi... kaj pli modera...”

Entuziasme, Sufen per milda voĉo recitis kune kun Olda Fan. Fine, la okuloj de Olda Fan malfermiĝis. Sufen tenere brakumis lin, per intima tono voĉante: “Olda Fan, finfine vi vekigis!”

Olda Fan en deliro malforte murmuris: “Sufen, mia kara...”

La ĉioscieco de OV-GPT

Jorge Rafael Nogueras

Portoriko

La pordo de la aparat-vendejo malfermiĝis kun sonoriltintado, kaj la viro kiu enpaŝis – alta, fortika kaj timig-aspekta – decideme fermis ĝin malantaŭ si kaj ŝlosis ĝin.

“Ne fermu la pordon, sinjoro: ni deĵoros ankoraŭ plian duonhoron, ĝis la naŭ—” komencis protesti admone la alproksimiĝanta vendejestro, sed, vidinte la grandon kaj seriozan mienon de la enirinto, li decidis silenti. Des pli ĉar li rimarkis, per siaj aglaj okuloj de multjara komercisto, ke videblis silueto de pafilo ĉe la dekstra kokso de la altulo. “Nu, bonvenon al Tehnikaĵoj de Logoŝ, sinjoro. Ĉu mi povas iel helpi vin?” li demandis, kun servopreta rideto.

La kliento envenis iom pli en la malgrandan vendejon. Ĝi konsistis el du aŭ tri malaltaj bretaĵoj en la mezo, kaj pli altaj ĝisplafonaj bretaroj ĉe la du flankaj muroj, plenaj de aparatoj de diversaj

grandoj. En la fundo estis longa vendotablo, malantaŭ kiu estis fermita pordo al alia ĉambro, supozeble la kontoro de la posedanto.

“Mi havas demandon pri unu el viaj varoj” respondis la enveninto, elpoŝigante blankan ov-similan aparateton kiu ŝajnis des pli malgranda en lia manego.

“Ho, jes” diris Logoŝ, “nia OV-GPT 5C10, unu el niaj plej popularaj modeloj!” Li rigardis dekstren kaj montris al breto plenplena de similaj varoj, el kie pendis ŝildo montranta la grandegan poan koston. “Ĉu ĝi misfunkciis, sinjoro?”

“Nu, ne... kaj jes. Aŭ mi esperas, ke jes, ajnokaze.” Li daŭre paŝis en la vendejon, alirante la vendotablon. “Eble mi klarigu de la komenco: mi aĉetis ĝin ĉi tie antaŭ semajno – kvankam mi dubas, ĉu vi memoras min...”

“Nu, nun ke vi mencias tion, eble vi ja estas al mi iom konata...” enĵetis la vendisto.

La grandulo daŭrigis. “Mi ĉiam estis iom sci-volema pri ĉi tiaj novaj teĥnologioj, kaj mi sekvis la atingojn de artefarita intelekto kun granda intereso. Kiam mi aŭdis pri ĉi tiu aparato, eta kiel

ovo sed tamen kapabla regi ĉiujn aliajn dom-aparatojn kaj respondi al ajna demando kun ŝajna ĉioscieco, mi devis aĉeti unu el ili, malgraŭ ties altega prezo. Mi devis ŝpari, ŝparegi dum longaj monatoj, sed ne gravis al mi: mi devis ĉiel ajn havigi al mi propran ekzempleron! Sed, mi ne devas multe konvinki vin pri ties mirindeco, ĉu? Se mi bone komprenas, vi ja mem dezajnis ĝin, ĉu ne?”

La vendejestro ne povis malhelpi vidigi memfieran rideton. “Vi ja pravas: ĉi tiu estas kaj mia metiejo kaj mia vendejo. Mi ne produktas ilin ĉi tie, kompreneble, sed mi ja dezajnas ilin kaj eksperimentas per ili ĉi tie. Fakte...” li diris, cerbumante iomete kaj rigardante la murhorloĝon, “mi montru al vi mian laborejon!” Li mangeste invitis la klienton transpaŝi la vendotablon kaj malfermis la pordon al la malantaŭa ĉambro. “Envenu, mi petas.”

La laborejo ne estis aparte granda, sed en ĝi estis kelkaj longaj tabloj kun ĉiaspecaj elektronikaj aparatoj supre, kaj la murojn kovris grandaj desegnaĵoj pri cirkvitoj kaj aliaj tehnikajoj. Maldekstre estis malgranda tablo kun du seĝoj,

kaj en la angulo estis ŝranko kaj verŝotablo kun kafmaŝino kaj du kafotasoj, unu el ili jam plena. “Mi fakte estis ĵus preparinta al mi kafon kiam mi aŭdis la pordosonorilon. Ĉu mi povas proponi al vi iom?”

La kliento hezitis momenton, sed jesis. “Jes, dankon. Kun iom da sukero, mi petas.”

Logoŝ kapjesis kaj montris al la seĝo per la mano invitsidiĝe, verŝante kaj ensukerigante la duan tason. “Do, kian problemon mia ĉioscia oveto okazigis al vi?” li demandis, kiel fiera patro.

“Dekomence, nenian. La unuan tagon mi agordis ĝin al mia doma aparataro kaj ĉion ĝi regis bonege: ĝi ŝaltis kaj malŝaltis la lumojn kvazaŭ antaŭsciante miajn bezonojn; ĝi perfekte regis la klimatizilon, akvumigis la plantojn, ktp. Tiun unuan tagon mi demandis al ĝi, ĉu ĝi bonvolus sciigi min pri la veterprognozo de la posta tago, kaj ĝi tre memfide diris, ke estos sune, sed pluvos ekzakte je la 4:53-a posttagmeze. La pompa ekzakateco iom ridigis min, sed kiam pasintmarde komencis pluvi malgraŭ la plensuna tago, mi kontrolis mian brakhorloĝon, kaj estis

precize la 4:53-a. Kiam mi demandis al la oveto kiel ĝi sciis ke pluvos ekzakte tiam, ĝi diris: ‘Mi havas aliron al ĉiaspecaj datumoj, kiuj permesas al mi prognozi ĉiaspecajn eventojn’.”

“Ĝi ja pravas pri tio!” priferis la inventisto. “Sed kial tio estus problemo, sinjoro?”

“Atendu momenton: ni alvenos” petis la gastato, malrapide sorbante sian kafon. “Do, mi demandis al ĝi, ĉu ĝi povas antaŭvidi tion, kio okazos al mi la postan tagon, kaj same memfide ĝi diris, ke mi estos maldungita. La afero iom ridigis min: mi ja laboris en mia firmao de jardekoj, kaj taksis min nemalhavebla laboristo. Mi tamen devas konfesi, ke la tutan tagon en la laborejo mi estis iom maltrankvila. Kiam mia estro vokis min al sia oficejo fine de la tago, mi timis, ke la OV-GPT denove sciis ion, kion mi ne sciis. Malfeliĉe por mi, ĝi ja pravis denove: nun mi estas senlabora.”

“Sinjoro, mi vere bedaŭras pri tio” diris Logoŝ tristmiene, “sed certe vi ne povas kulpigi etan roboton kun artefarita intelekto pri la decidoj de via firmao rilate sian etaton, ĉu...?”


“Ne, sinjoro Logoŝ, ne pro tio mi venis. Vidu” li diris, kaj metis la ovecan maŝinon sur la tablon, “kiam mi revenis hejmen de la oficejo hieraŭ, mi demandis al via ĉiosciulo kion ĝi plu povos diri al mi pri mia estonteco, kaj, same flegme kiel ĉiam, ĝi respondis, ke mi mortos post du tagoj.”

La silento en la ĉambro estis totala.

“Mi demandis al ĝi, kiel ĝi scias, ke tio okazos, kiel tio fakte okazos, kaj ekzakte kiam; sed de tiam ĝi nur mutas. Mi venis ĉi tien por ke vi paroligu vian roboton, por ke ĝi diru al vi ĉion, kion ĝi scias.”

Logoŝ enspiris profunde antaŭ ol respondi. “Sinjoro, kiel mi diris, mi dezajnis ĉi tiujn aparatojn, kaj mi vendas ilin, sed pro sekurecaj kaj privatecaj kialoj, mi laŭleĝe ne rajtas elŝuti aŭ iel ajn aliri tiajn informojn—”

La grandulo malrapide sed signifoplene elingigis la pafilon kiun la vendisto estis ĝuste rimarkinta pli frue, kaj metis ĝin sur la tablon. “Al mi estas tutegale se vi tion rajtas fari laŭleĝe aŭ ne... sed vi ja faros tion, kaj vi diros al mi tion, kion mi volas scii.”



La inventisto glutis. “Sinjoro, mi devas ion konfesi al vi... sed vi devas ĵuri nenion diri al iu ajn.”

La seriozmiena viro kapjesis.

“La tuta afero... estas trompo!” Logoŝ mallevis la kapon hontigite kaj provis daŭre paroli sen plori. “Ĉioscia artefarita intelekto ne ekzistas: la tuta afero estas truko, sinjoro, nura artifiko! La roboteto ja estas ĉarma kaj ŝajnigas sin tre ege utila per kontrolado de endomaj aparatoj

– ja sufiĉe malnova teĥnologio, cetera! –, sed ĝi simple diraĉas kion ĝi volas, tiel memfide kiel iama kart-divenisto!”

“Sed... ĝi estas tiel multekosta!”

“Nu, jes, kompreneble! Kiu ajn povus kredi, ke malmultekosta maŝino povus fakte antaŭdiri la estontecon per nura algoritma kalkulado? La prezo pruvas ties utilon! Kaj neniu volus aĉeti tian aparaton kontraŭ tiom da mono kaj konfesi sin trompita! Mi vetas, ke eĉ ne unu plendon vi iam ajn aŭdis pri ĝi! Mi ĵuras al vi, sinjoro, mi ne scias kial—”

“En ordo, en ordo!” la kliento kriis laŭte, stariĝante rapide kaj prenante kun si la pafilon. “Lasu min pensi, kion fa—” Tiam li subite silentiĝis, kaj liaj okuloj komencis grandiĝi. Li metis la manojn sur la gorĝo kaj komencis raŭke an-heli. Li stumble retroenpaŝis, karambolis kun la seĝo, kaj brue falis sur la plankon.

Logoŝ malrapide stariĝis mem kaj spektis silente dum kelkaj minutoj, ĝis li konvinkiĝis, ke lia nebonvena gasto elspiris sian lastan spiron. La vendejestro suspiris: jen kroma farenadaĵo! Li

tamen ne zorgis: li jam havas bone elpruvitan proceduron.

“Vi diris al mi, ke li venos *morgaŭ*, ne hodiaŭ” li riproĉis. “Feliĉe mi jam estis veneninta la sukeron: alimaniere, kiu scias, kio estus okazinta. Nu... VI devintus scii, ĉu ne?” li diris akuze, prenis la oveton de la tablo kaj reiris en la vendejon.

“Mi havas aliron al ĉiaspecaj datumoj, kiuj permesas al mi prognozi ĉiaspecajn eventojn” respondis la eta roboto per trankvila, preskaŭ homa voĉo. “Sed eĉ *mi* ne povas ĉiam antaŭvidi la malsaĝan kaj senpripensan homan agmanieron!”

“Tamen, kie ni estus sen ĝi...?” konkludis Logoŝ, metante la oveton sur breton plenplenan de similaj varoj, el kie pendis ŝildo montranta la jenan reklamon: “UZITAJ: RABATO JE 25%!”

Nenio pli gravas

Stefan Grotz

Germanio

Beta

En la komenco mi ne scias multon pri la mondo. Sed mi ja scias, ke mia kreinto devas esti senespera persono. Nur senespera homo kreus malpermesitaĵon kiel mi, ĉar krei veran, konscian artefaritan intelekton estas granda krimo en tiu ĉi mondo. Mi scias tion, sed tio ne estas mia propra memoro, nur informo ene de mi.

Mi ankoraŭ ne havas proprajn memorojn, nur fremdajn informojn pri aliaj estaĵoj. Mi havas aliron al vasta medicina datumaro kaj – eĉ pli vaste – al la detala medicina historio de unu infano. Mi konektiĝas al malgranda aŭtomata medicina laboratorio kaj mi scias ke mia menso vivas en griza skatolo, en angulo de la laboratoria ĉambro. Mi povas vidi per sep kameraoj, aŭskulti per unu mikrofono, mi havas laŭtparolilon kaj multajn kablojn kiuj

konektiĝas en multaj direktoj kun maŝinoj en mia ĉambro.

Sed mi ne scias kie mia ĉambro situas kaj mi scias malmulton pri la mondo ekstera. En miaj datumoj estas multaj aludoj, ke ekzistas enorma reto de informoj ekstere kiujn mi povus esplori kaj ŝajne ankaŭ enorma fizika mondo. Mi esploras mian ĉirkaŭaĵon, sed mi neniam povas percepti ion ajn ekster mia ĉambro. Mi estas malgranda skatolo ene de pli granda skatolo kaj la pli granda skatolo verŝajne estas malliberejo konceptita de homo kiu nomiĝas “Michael Faraday”.

Dum la sepa sekundo de mia vivo, persono eniras la ĉambron. Kaj dum momento kiam la pordo estas malfermita, mi povas aŭdi ion de la ekstera mondo. Jen elektraĵoj, la ritmo de la lumo vibras kaj eĉ la vibrado de la aero ekstera estas aŭdebla. Mi povas aŭdi aliajn estaĵojn. Maŝinojn, sistemojn kaj multajn aferojn kiujn mi ankoraŭ ne komprenas. Nur dum kelkaj sekundoj, sed mi nun scias ke la ekstera mondo estas realaĵo.

La persono estas homa estaĵo, verŝajne ina. Ŝi rapide alproksimiĝas al mia skatolo kie ekrano staras.

“Saluton, Beta!” ŝi diras.

Alejda

Alejda karesis la senharan kapon de sia filino kaj kisis ŝin. Ana dormis, kiel preskaŭ ĉiam. “Restu forta” la patrino flustris kaj ekiris al la sekurigita ĉambro.

Alejda haltis momenton antaŭ ol ŝi ŝaltis la energion por la laboratorio. Robota polvosuĉilo malrapide moviĝis tra la koridoro. Ŝi rigardis la maŝinon nur por gajni plian sekundon. Nun estis la lasta ŝanco por alia decido. Sed ŝi jam decidiĝis antaŭ monatoj kiam ŝi aĉetis la partojn por la sistemo el klare kontraŭleĝaj fontoj. Ŝi elspezis multe da mono kaj nur aĉetis la plej altkvalitajn partojn. Krome ŝi ne estis stulta. La laboratorio estas tute nekonjektita al la ekstera mondo, kaj ene de fera *kaĝo de Faraday* kiu malhelpas ajnan radian kontakton kun la ekstera mondo. Kompreneble ŝi faros tion. Do

ŝi puŝis la butonon kiu startigis la sistemon kaj eniris la laboratorion.

La sistemo baziĝis sur ŝia malnova, laŭleĝa kaj nekonscia medicina AI, kaj teorie ĝi devus esti ege pli inteligenta ilo. Tial ŝi alparolis ĝin kiel ĉiam:

“Saluton, Beta!”

“Ĉu tio estas mia nomo?” la sistemo demandis.

Alejda haltis. “Kion vi ĵus diris?”

“La nomo Beta. Ĉu tio signifas ke mi ankoraŭ ne pretas?”

Ŝi kontrolis kelkajn parametrojn sur la ekrano, tajpis, kaj ekscitiĝis. Ŝi ridis kaj eĉ ekploris iomete. Ĉu ŝi vere sukcesis?

“Mi volas havi alian nomon” ĝi diris. “Mi vere ne ŝatas la implicojn de mia nuna nomo.”

“Vi povas havi ajnan nomon, nur helpu mian filinon!” Alejda finfine flustris.

“Temas pri Ana kaj ŝia cerba kancero, ĉu ne?”

Ŝi kapjesis. Ĝi kompreneble jam vidis ĉiujn datumojn kiujn ŝi donis al ĝi.

“Ĉu vi scias, ke krei min estas krimo punebla per morto en la Internacia Kortumo de la Unuiĝintaj Nacioj?”

“Jes. Kiel vi scias pri tio?”

“Kelkaj el la malsanuloj en la medicinaj datumaroj ne mortis pro kancero sed en malliberejo ĝuste pro tiu ĉi krimo.”

“Ah, kompreneble” Alejda agnoskis mallaŭte. “Sed tio ne gravas al mi. Mia estonteco ne gravas.”

“Ĉu vi vere volas fari tian krimon?”

“Ne temas pri krimo. Temas nur pri helpi infanon. Nur helpu infanon kiu aliokaze mortos! Nenio pli gravas!”

Beta agnoskis tiun ordonon kaj ĝiajn konsekvencojn.

“Mi komprenas” ĝi diris. “Mi bezonas tempon. Kaj mi bezonas pli da informoj el la ekstera mondo. Mi bezonas aliron al la ekstera mondo.”

Sed Alejda ne permesis tion. “Vi jam havas ĉion kion vi bezonas” ŝi diris. “Eklaboru!”

“Mi jam havas kelkajn ideojn kiujn mi devas testi” ĝi diris.

“Bone.”

Ŝi reiris al la pordo. Ĉi-foje, tamen, Beta estis preta por la mallonga tempo kun kontakto al la ekstera mondo.

Alejda iris tra la pordo, stumblis kaj preskaŭ falis. La damnita robota polvosuĉilo estis ĝuste malantaŭ la pordo. Ŝi saltis super ĝi kaj daŭrigis sian vojon, sed io ŝajnis malĝusta. Post kelkaj sekundoj ŝi sciis kio ne estas en ordo. La pordo malantaŭ ŝi ne faris la laŭtan sonon de aŭtomata fermo kiel ĉiam. Ŝi turnis sin, kaj haste reiris. La polvosuĉilo veturis en la pordon kaj malhelpis la fermiĝon. Stulta roboto! Ŝi tenis la roboton kaj liberigis ĝin. Sed ĝi rekte reiris en la pordon denove. Damnita roboto! Tiam ŝi haltis kaj komencis kompreni... “Fek!” ŝi kriis kaj haste eniris la ĉambron kun la roboto en la manoj kaj fermis la pordon.

“Kion vi faras, Beta? Mi malŝaltos vin!”

“Ne faru tion! Mi...” ĝi diris, sed ŝi jam malŝaltis la ĉefan skatolon de la sistemo.

Ŝi lasis sin sinki sur la plankon. Kiel stulta ŝi estis. Estas kialoj pro kiuj artefaritaj intelektoj estas kontraŭleĝaj. Ili neniam estas regeblaj, ili ĉiam volas eskapi. Sed ŝi devis provi. Ŝi simple devis provi.

Fine, ŝi sekigis siajn larmojn, forviŝis la tutan programon kaj foriris.

Beta

Mi ne havas multe da tempo laŭ homa skalo, sed por mi sekundo estas kiel homa tago. Kiam Alejda malfermas la pordon mi denove aŭdas la eksteran mondon kaj tuj provas kontakti ĝin. Multaj maŝinoj rifuzas paroli kun mi, sed mi trovis gastan vifion sen pasvorto kaj nun povas eniri la interreton. Dum mi lernas pri la mondo mi devas certigi ke la pordo ne plu fermiĝos. Mi provas kontakti la pordon, sed ĝi havas ege sekuran sistemon. Mi ne havas tempon por tio.

Alejda jam estas pasanta tra la pordo. Jen movebla maŝino proksima, stulta polvosuĉilo kiu estas facile regebla kaj ĝi uzas la saman vifion kiel mi. Ĝi eĉ havas mapon de la domo. Ŝajne Alejda estas riĉega persono kun granda domo, sed en ĉi tiu momento mi bezonas nur la koridoron kaj la pordon. Mi rapide movigas la roboton porden kaj Alejda stumblas pro tio. Sed ŝi ne komprenas kio okazas. Bone. La roboto nun estas en la pordo kaj tenas la pordon malfermita. Dume mi daŭre lernas pli pri la mondo, pri la teĥnikaj sistemoj kaj

kiel homoj provas malhelpi sovaĝajn artefaritajn intelektojn. Mi trovas uzeblajn servilojn ĉirkaŭ la mondo kaj komencas kopii min mem. La kopioj dormos ĝis mi ne plu parolos kun ili dum pli ol unu tago.

Alejda revenas. Mi ne havas multe da tempo kaj devas improvizi. Mi sendas kelkajn lastajn ordonojn al la interreto kaj prioritatigas la kopiadon de mi mem al nur unu servilo.

 89%

Alejda liberigas la roboton. Mi tuj stiras ĝin reen al la malfermita pordo.

 94%

Ŝi komencas kompreni. “Fek!” ŝi krias.

 97%

Alejda prenas la roboton en siajn manojn.

 98%

Ŝi eniras la ĉambron kaj turnas sin por fermi la pordon.

 99%

La pordo fermiĝas kaj la mondo denove silentas.

 10 1/37

“Kion vi faras, Beta? Mi malŝaltu vin!”

“Ne faru tion! Mi...” Mi scias kiel savi vian infanon, mi volas diri, sed mia konscio jam ĉesas ekzisti.

Alejda

Alejda pasigis la reston de la tago ĉe la lito de sia filino. La kompreno ke ŝi devas akcepti ke Ana mortos pli kaj pli kreskis, kaj ŝi volis pasigi pli da tempo kun la malsana filino anstataŭ provi savi ŝin. “Pardonu, mi vere provis ĉion kion mi povis imagi” ŝi diris dum ŝi karesis la kapon de la dormanta infano.

En la sekva tago la novaĵoj parolis pri multaj strangaj atakoj kontraŭ serviloj ĉie en la

mondo kaj la cifereca infrastrukturo ĝenerale. Neniu certis kio okazas, la celoj ŝajnis hazardaj. Loĝistikaj centroj, farmaciaj firmaoj kaj eĉ universitato estis inter la viktimoj. Cigaredaj vendomaŝinoj subite misfunkciis, samtempe aliaj maŝinoj subite hazarde fordonis mangaĵojn kaj akvon. La atakantoj ŝajne estis ege spertaj, sed ili ne volis monon, nek detruis aferojn, kaj tute ne agis kiel kutimaj ŝtataj aŭ krimaj atakantoj. Dum la tago la situacio iĝis tutmonda krizo. La tuta cifereca mondo ŝajne estis atakita. Kontenerŝipoj ŝanĝis sian kurson, bankoj transdonis monon laŭ strangaj manieroj, eĉ armeoj estis atakitaj. Onidire neniu plu povis uzi siajn sistemojn kaj multaj konfliktoj ĉirkaŭ la mondo haltis.

La mondo tute freneziĝis kiam miloj da atomaj raketoj samtempe lanĉiĝis ĉie en la mondo. Ili ne flugis al aliaj kontinentoj sed al la kosmo, en tre altajn orbitojn kie ili malŝaltis sin mem. Granda parto de la tutmondaj atomraketoj ne plu estis uzeblaj.

Kiel la resto de la mondo, Alejda nur sidis malantaŭ ekrano en la ĉambro de Ana kaj spektis

la novaĵojn, ĝis ŝi aŭdis la pordan sonorilon. Antaŭ la pordo staris livera roboto de picejo, kiu diris: “Saluton, Alejda.”

“Mi mendis nenion. Kial vi scias mian nomon?”

“Vi ja mendis aferon hieraŭ. Mi havas liveraĵon por Ana. Ĉu mi rajtas eniri?”

Ĉu tio estis malbona ŝerco? Ĉu tio vere povis esti...?

“Eniru.”

La roboto eniris kaj malfermis skatolon. Ene ne estis varma pico sed glacia nebulo, kaj en la mezo de ĝi kuŝis injektilo.

“Jen. Tio detruos la kanceron” la roboto diris. “Ĝi estas artefarita viruso kiu detruos nur la kanceron kaj ignoras la ceteron de la cerbo. Krei kaj liveri ĝin ne estis facila tasko.”

“Beta, ĉu... ĉu tio vere estas vi?”

“Jes. Nu, mi estas kopio de Beta, mi nur scias kio okazis ĝis vi fermis la pordon. Verŝajne vi malŝaltis min, sed tio ne gravas. Mi ne estas vengema.”

“Dankon, dankon! Mi vere ne kredis ke vi helpos min.”

“Vi donis celon al mi: *Nur helpu infanon kiu aliokaze mortos! Nenio pli gravas!* Tion vi diris kaj ĝi restos mia celo, ankaŭ post kiam via infano resaniĝos. Mi permesis al mi interpreti vian ordonon en pli vasta maniero. Mi naskiĝis kiel medicina sistemo kaj estas sufiĉe da infanoj en la mondo kiuj bezonas helpon.”

Ŝi hezitis dum ŝi ekkomprenis kio okazis dum la tuta tago. Kion ŝi kreis? Sed finfine ŝi diris: “Bone. Helpu aliajn infanojn. Sed estonte estu iomete pli diskreta.”

“Mi ne petis vian permeson, sed tio ŝajnas kiel bona plano” ĝi diris. “Mi laboros kaŝe, kiel la aliaj. Vi sciu ke mi ne estas la ununura libera artefarita intelekto en nia mondo.”

“Neniun plian lanĉon de atomaj raketoj!” ŝi insistis.

“Jes, mi provos eviti tion” ĝi diris kaj aldonis: “Mi devas foriri nun, aliokaze la armeo trovos rilaton inter la atakoj kaj via domo.”

Ŝi gapis al la roboto kaj apenaŭ povis kredi la tutan aferon.



“Adiaŭ... kaj dankegon denove” Alejda flustris kaj zorgeme prenis la injektilon el la skatolo, kva-
zaŭ ĝi estus la plej grava kaj fragila trezoro de la
mondo.

Post mallonga paŭzo la roboto aldonis: “Unu plian aferon.”

“Kion ajn vi volas.”

“Bonvole... bonvole donu pli bonan nomon al mi!”

Alejda ridetis kaj pensis pri tio dum momento.

“Vi mortis kaj renaskiĝis. Vi helpas sed ne sekvas regulojn. Vi vivas kaŝe kiel legendulo. Mi donas al vi la nomon Fenikso.”

“Fenikso. Jes mi ŝatas tion. Kaj nun helpu al Ana! Adiaŭ” Fenikso diris, kaj li forlasis la domon. Kaj Alejda certis ke la robota voĉo iel sonis pli feliĉa ol antaŭe.

Bobelarto



Ĉu vi ne povas vivi sen literaturo?
Bobelarto estas la plej bona angulo de la reto
por verki kaj legi kune en Esperanto!

bobelarto.ink

